

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 301 (68) - KVINA EPOKO

DECEMBRO 1997



ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO



KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo

Peranto de UEA, FEL, Literatura Foiro, IKEL, La Kancerkliniko

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio

Tel + Fakso (93) 716.36.33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20h.).

Ret - **adreso:** kea@stel.net

Ret - **paĝo:** <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 1997: Individua Abonanta Membro 3.350 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.700 p-toj; Individua Dumviva Membro 67.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.700 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - agència 461 Sabadell. Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; Viceprezidanto: Lluís Armadans; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; Kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Miguel Ángel Altuna, Arnald Massanas, Joan Marimon, Lluís Aragay, Mercè Porta, Paco Belmonte Felip Artero.

Kontrola Komisiono: Èric Collignon, Bartomeu Costa, Ramon Perera

Kataluna Esperantisto: M.A. Altuna, C. Berga, P. Bernús, Ll. Puig, O. Puig, X. Rodon, Luz Vázquez

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 BARCELONA

Impres a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. (93) 725.50.91

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

ĈU VI ŜATUS KONI LA CSEH-METODON ?

TREJNSEMINARIO

Por tiuj kiuj deziras instrui laŭ tiu ĉi rekta metodo aŭ simple ampleksigi siajn pedagogiajn konojn.

OKAZOS

En Barcelono ĉe **Unesko-Klubo**.
(Mallorca 207, pral).

Vendredoj 16a kaj 23a de januaro 1998 inter 19a kaj 21a horoj.

Sabatoj 17a kaj 24a de januaro 1998, la tutan tagon.

GVIDE

De dr-ino **Katalin Smidéliusz**, hungara esperantisto, diplomita instruisto pri matematiko, profesorino pri Esperanto, rusa kaj itala lingvoj, metodologistino, Cseh-metoda instruistino.

Jen resumo de la informilo, kiun niaj membroj ricevis aparte.

KEA deziras feliĉan kaj prosperan jaron 1998 al ĉiuj siaj membroj kaj legantoj.

BIBLIOTEKO-ARKIVO "PETRO NUEZ" INAŬGURITA

Kun partopreno de 40/50 geesperantistoj diverslokaj okazis la inaŭguro de la nova Biblioteko-Arkivo "Petro Nuez" de nia asocio, dimanĉe la 14an de decembro, okaze de la Zamenhof-Festo en la sidejo de Centro de Esperanto Sabadell. La tabulon malkovris Maria Garcés, vidvino de la karmemora pioniro (vidu frontpaĝan foton).

KEA deziras plej baldaŭ disponigi la Bibliotekon je la scivolemo kaj studemo de ĉiuj esperantistoj kaj tiucele ĝi pretigas taŭgan regularon, kiun ni diskonigos plej rapide.

PRI LA OMAĜO AL MANUEL DE SEABRA

Dum la akademie omaĝo al nia eminenta samideano okazinta mardon la 19an de novembro 97, organize de la Asocio de Verkistoj de Katalunio, ni povis aŭskulti tre interesajn prelegojn pri la verkista vivo de la omaĝato kun elstara mencio pri tiu en Esperanto de Herbert Mayer, direktoro de la E-Muzeo en Vieno, kies tekston ni aperigas en tiu ĉi sama revuo. Pluraj esperantistoj ĉeestis la omaĝon. Ni tutkore gratulas nian omaĝitan samideanon kaj deziras al li ankoraŭ pli grandajn sukcesojn privatajn kaj profesiajn.

FOIRO DE ASOCIOJ

Kiel anoncite en nia antaŭa revuo, dum la 31-a de oktobro, 1-a kaj 2-a de novembro okazis en Sabadell la unua versio de la Foiro de Asocioj neprofitcelaj pro iniciato kaj organizado de la loka Junula Komerĉambro.

KEA partoprenis tandeme kun la loka Centro de Esperanto Sabadell en la sama budo kaj krom prezento de la instrua vidfilmo "Mazi en Gondolando" oni distribuis kelkajn centojn da informiloj.

Aldone al tiu Foiro, merkredon la 29an de oktobro okazis prelego de D-ro Ludoviko de Yzaguirre en la aŭditorio de la loka Komerĉambro, kiu vekis egan intereson ĉe la bedaŭrinde nemultnombra ĉeestantaro.

REUS

Por festi la 96an naskiĝdatrevenon de nia kataluna dojeno Salvador Gumà el Reus, la tieaj samideanoj kunmanĝis en loka restoracio la 30an de septembro 1997 (vidu foton)

En la loka prestiĝa asocio "Centre de Lectura" okazis prelego de Abel Montagut pri Esperanto la 19an de novembro.

La loka liberecana revuo "La Llettra A" en sia numero 51 (novembro-decembro 97) plurfoje menciis Esperanton (sur paĝo 34 aperas informo pri okazinta renkontiĝo de Liberecana Grupo el Tuluzo en la kataluna Pireneo; kompletaj paĝoj 57 kaj 58 kun kataluna traduko de Joan Marimon pri artikolo el Monato; kompleta paĝo 59 kun E-kurso kiu aperas daŭre de antaŭ kelkaj monatoj kaj paĝo 72 kun informo pri la biblioteko de la Liberecana Ateneo en A Coruña (Joan Marimon).



HERBERT MAYER ĈE UNESKO-KLUBO

Sabaton la 22an de novembro nia elstara samideano prelegis antaŭ tridek geesperantistoj pri la rolo kaj valoroj de la E-literaturo kaj ankaŭ pri la ekesto kaj historio de la E-Muzeo en Vieno kiun li gvidas. (sur la foto aperas la preleginto tute maldekstre kun Manuel de Seabra kiu prezentis lin).



PROJEKTO BOSNIO

Publike prezentiĝis la solidaraj eldonoj de KEA enkadre de la kunlabora programo kun ELBH (Esperanto-Ligo Bosnio-Hercegovino), okaze de la Zamenhof-Festo, sabaton la 13an de decembro 97 ĉe Unesko-Klubo en Barcelono. Temas pri la revuo Bosnia Lilio kaj la libro Spite al ĉio Bosnio.

La gvidanto de la E-Fako ĉe Unesko-Klubo Lluís Armadans enkondukis la programon, sekvis interveno de Llibert Puig kiu detale informis pri la evoluo de la projekto kaj finiĝis la prezento per la interveno de Miro Hadzi Hasanovic, nome de la Bosnia Domo en Barcelono kiu dankis nian asocion pro ties iniciato.



La Komisiono Sabadell Solidara ĵus sendis al ni la raporton pri sia agado dum 1996 kaj inter la diversaj plenumitaj solidaraj projektoj, aperas tutpaĝa informo kun foto pri la trisemajna somerumado de 15 bosnaj infanoj en Katalunio, kiun KEA kaj CES organizis.

ĈE BARCELONA TV

Mardon la 2an de decembro, niaj aktivuloj Pako Belmonte kaj Llibert Puig estis intervjuataj pri Esperanto en la ĉefurba kataluna televidstacio.

PRI JOAN MASCARÓ

(vidu KE-300-paĝo 7-a)

Okaze de lia centjara naskiĝdatreveno la katalunaj amaskomunikiloj pritraktis liajn meritojn. Nia elstara samideano Manuel Casanoves sukcesis aperigi en la ĵurnalo "La Vanguardia" leteron de leganto per kiu li atentigas pri la esperantisteco de la majorka eminentulo, okaze de ilia interkonatiĝo dum la 56-a UK en Londono la jaron 1971.

LA ROLO DE ESPERANTO EN LA VERKARO DE MANUEL DE SEABRA

La temo, kiun proponas pritrakti tiu omaĝo al Manuel de Seabra ŝajnas enteni kontraŭdiron: ja patrion oni povas havi nur unu. Havi du eĉ tri por multaj estas same sensenca, kiel havi du patrojn aŭ patrinon. Laŭ certa kredo, homo devas firme radikiĝi en unu patrio. La malo de tio estis - kaj eble ankoraŭ estas - konsiderata kiel suspekta kaj danĝera. 1

Evidenta fariĝas la konflikto, se du specoj de patrio kolizias inter si: tiu de la ŝtato kaj tiu de la lingvo. Pri ĉi problemoj kaj ties ingrediencoj certe ne necesas paroli ĉi tie en Katalunio, tamen ĝi piednotas la krizon kaj en la oficiala kaj en la individua konscioj, se prezentiĝas du patrioj, el kiuj ambaŭ sin proponas kiel krea medio de komuna sento kaj persona identeco.

Kun la kresko de naciismoj en la 19-a jarcento tiu dilemo fariĝis akuta kaj la respondo al tio estis la strebo al kreo de etne "puraj" -kia terura vorto!- ŝtatoj kaj la ligo de etneco kun certa teritorio:

Kie vivas la etno X, ne rajtu vivi la etno Y.

Laŭ ĝenerala opinio patrion kaj lingvon oni heredas. Sed jen homo, intelektulo, verkisto, kiu elektas kaj patrion kaj lingvon. Manuel de Seabra naskiĝis portugalo, la ŝtato, en kiu li vivas estas Hispanio, la elektitaj lingvoj krom la gepatra estas la kataluna kaj Esperanto.

Por iom kompreni ĉi lastan -en la okuloj de multaj- strangan elekton, ni aŭskultu la aŭtoron mem. Per la postparolo al sia unua romano publikigita en Esperanto, "La armeoj de Paluzie", li prilumas la estiĝon de tiu verko:

"La ideo verki tiun ĉi romanon naskiĝis (...) multe antaŭ 1970, kiam mi komencis ĝian verkadon en la portugala lingvo. Sed, ve, kiam mi alvenis al la kvindeka paĝo, ne eblis daŭrigi ĝin. Mi sentis min inhibiciita de la multaj aŭtobiografiaj elementoj, kiujn la historio enhavis. Multaj roluloj ankoraŭ vivis, "Villo Apia" ankoraŭ brilis en strato Campolide (...) Kiel atingi la deziratan distanciĝon, por ke tiun materialon mi povu uzi seninhibicie? Tute simple aŭ tre komplikite: kial ne verki ĝin en Esperanto? Antaŭe mi kutimis verki rakontojn kaj poemojn en Esperanto kaj poste traduki ilin en la portugalan por publikigo (...)

Sed uzi tiun teknikon en tuta multpaĝa romano ŝanceligis min. Tamen mi komencis tajpi. (...) mi laboris tre rapide, preskaŭ senhalte, transformante la historion kaj provante doni al ĝi korpon. Kiam mi venis al paĝo 150, mi komprenis, ke la romano estis jam en la kaĝo, bone kaptita. Mi estis sola, mia artistino-edzino estis en Barcelono okaze de ekspozicio. Mi memoras, ke mi telefonis al ŝi por doni la bonan novaĵon: "Mi jam ĝin havas!" "En kiu lingvo?", ŝi demandis, konscia pri miaj problemoj. "Speco de Esperanto!" "Bone" ŝi murmuris ĉe la fino de la telefondrato, "nun la problemoj estos publikiĝo."

Seabra per tiuj vortoj atentigas pri tre grava faceto en la literatura kreado: aŭtoro devas sendependiĝi iel de siaj propraj spertoj kaj emocioj. Temas pri fenomeno de necesa objektivigo de sentoj: por esti ingrediencoj de bona literatura verko, necesas, ke la esprimoj akiru en la menso de la verkisto dimension universale homan kaj ĝenerale validan. Ĉi tiu akiro de universaleco - malgraŭ la evidentaj ligoj al certa socio kaj epoko - estas la bazo de ĉiu verko de la monda literaturo.

En tiu procezo Seabra utiligis Esperanton. Ne sen fortaj kialoj. Por tion ilustru, permesu, ke mi per mallongaj vortoj skizigu la estiĝon kaj la specifajn trajtojn de tiu lingvo.

Esperanto diferenciĝas disde la etnaj lingvoj pro la fakto, ke ĝi havas precizan naskiĝodaton: la 21an de majo 1887 la cara cenzuro permesis la eldonon de 40-paĝa broŝuro. Ĝia enhavo: eseo, projekto de lingvo internacia kun 16-regula gramatiko kaj 900 vortoj internaciaj en unueca ortografio - kaj poemoj. La aŭtoro: la pola, jud-devena oftalmologo d-ro L.L. Zamenhof, kies pseŭdonomo estis d-ro Esperanto. Tiu broŝuro fariĝis la elirpunkto de la evoluo kaj konstituiĝo de la planlingvo, kiu nomiĝas laŭ la pseŭdonomo de sia iniciatinto.

Estas tre grava la konstato, ke temas pri lingva projekto, kiu fariĝis plena lingvo nur pere de praktika apliko. Se oni nomas Zamenhof la kreinto de Esperanto, tio nur estas duona vero. Zamenhof metis nur la bazon, dum la lingvo en sia hodiaŭa formo estas la frukto de pli ol centjara uzo en internacia lingvokomunumo. En tiu disvolviĝo de la

esprimkapablo de Esperanto, literaturaj verkoj ludis gravan rolon.

El tiu fakto fontas la fenomeno, ke relative al la nombro de la Esperanto-parolantoj la Esperanto-aŭtoroj kaj poetoj estas multaj. En la komenco la rezulto de tiu literatura kreado estis modesta kaj kvalite ne superis diletantajn aspirojn. Intertempe tamen ĝi portas fruktojn en kvalito facile kompareblajn al tiuj de etnaj lingvoj. En 1993 la monda PEN-Klubo agnoskis la literaturan valoron de Esperanto per oficiala fondo de rupo de Esperanto-lingvaj aŭtoroj. Unu el la pintoj de la nuntempa literatura sceno estas ĝuste Manuel de Seabra.

Jen flanko alloga de Esperanto: ĝi estas juna lingvo, ankoraŭ fleksebla kaj modlebla, ĝi pli facile cedas al la bezonoj de postulema verkisto ol lingvo rigidiĝinta en miljara uzo. Kio do povas ŝajni malavantaĝo - la ankoraŭ malgranda diakrona dimensio - aperas en tiu punkto kiel avantaĝo. Claude Piron, svisa psikologo, tion jene formulis:

“Esperanto prezentas multajn avantaĝojn al tiu, kiu aliras ĝin verkiste.(...) la ĝenerala etoso de libereco (...) ebligas esprimi per plej simplaj rimedoj nuancojn alilingve neformuleblajn” 2

Ne minimuma kodo Esperanto estas, sed plene evoluinta lingvo kun specifaj kaj karakterizaj trajtoj, kiuj ebligas ĝian rektan aliron kaj plenan kompetenton, kvankam ĝi nur esceptkaze rolas kiel gepatra lingvo.

Certe kelkaj objestos al tiu aserto, ke lingvo ĉiam pregatas de la socio kaj ties kulturo, neblas do esprimi en lingvo internacia tiujn fajnajn nuancojn, tiujn subtilajn etosokreajn referencojn kaj aludojn, el kiuj vivas kaj aspiras arta verko. Tiuj kontraŭ-argumentoj unuavide ne facile refuteblas, sed aliflanke Manuel de Seabra malgraŭ tio elektis tian idiomon kiel literaturan vehiklon- kaj certe li havis siajn kialojn.

Ni ne forgesu, ke li estas ankaŭ unu el la plej fruktodonaj tradukistoj sur la ibera duoninsulo. La ĉiutaga sperto de tradukisto koncernas la fakton, ke necesas transigi de lingvo A al lingvo B ne nur la sencon, la enhavon, sed ĝuste tiujn etosokreajn nuancojn, kiuj estas forme ligitaj al la kulturo kaj medio de la fontolingvo kaj ofte nur en nesufiĉa grado disponeblas en la cellingvo. Vi jam komprenis, aludiĝas tiu problemo de “traduttore - traduttore”, eldiro, laŭ

kiu ĉiu tradukanto perfidas la originalon. Sed estas necese perfidi, ĉar ne estas alternativo, se la efiko de certa literatura verko transiru de sia originala lingvo. Se ekzemple vi tradukas katalunan romanon al la germana, vi dependas de la rimedoj de tiu cellingvo kaj devas adaptiĝi al ili, rezignante iom pri la gusto de la originalo. Sed kion oni gajnas kontraŭ tiuj etaj rezignoj, estas konsiderinda: ke la kelkaj milionoj da pliaj legantoj havu aliron al la verko.

Simile statas la afero pri Esperanto. Esperanto - kaj neniu alia lingvo - ne povas fari miraklojn: en ĝi vi ne povas ĉion precize same formuli kiel en via denaska dialekto, sed devas trovi aliajn rimedojn. Kion vi gajnas per tio, estas la kompreno en internacia lingvokomunumo.

Tiel legante la Esperanto-originalojn de la romanoj de Manuel de Seabra kaj komparante ilin kun la etnolingvaj versioj, vi certe rimarkas jen kaj jen diferencetojn, eĉ diferencojn. Tamen la demando ĉi tie estas, kio estas gajno kaj kio perdo: ja ankaŭ la Esperanto-versio disponas pri ecoj ne rekte katalunigeblaj aŭ portugaligeblaj. Krome en kazo de plurlingvaj eldonoj de unu verko, li neniam simple tradukas, sed ĉiam remodlas ne nur unuopajn stilerojn, foje eĉ la strukturon de la rakonta fluo mem. Al la Esperant-lingvaj eldonoj la aŭtoro metas specialan atenton, tiel ke li deklaras ilin kiel la “ gvida(j) versio(j), kiu(j)n ĉiuj estontaj eldonoj kaj tradukoj devos obei”. 3

Sed ni revenu al la problemo de universaligo: la koncipiĝo de ne malmultaj verkoj de Manuel de Seabra rekte en Esperanto, do en lingvo, kiu ne estas ligita al nur unu kulturo, permesis al li akiri distanciĝon de la medio ĉirkaŭanta lin por meti la tuton en kadron pli objektivan kaj universalan. Kaj ne povas ne esti, ke tia literatura eksperimento, se li permesas al ni utiligi tiun vorton, akriĝis liajn sentojn unuflanke pri la diferenco inter la esenco kaj la incidentaĵoj de la interhoma komunikado.

Sed Manuel de Seabra verŝajne pri tia argumentado nur povas mire balanci la kapon, ja tiuj trivialaĵoj pri translingveblo aŭ ties neeblo estas lia ĉiutaga pano de tradukisto. Krome li certe ne apartenas al la kategorio de homoj havantaj romantikajn imagojn, laŭ kiuj lingvo estas viva organismo. Li kreas pli laŭ la motivo rem tene, verba sequenter, en kies centro estas la mesaĝo kaj ne la formo. Lingvo kaj lingvaĵo estas por Manuel de Seabra ne organismo, sed instrumento

ILEI ĈE NI

per kiu li laboras, ne lin dominanta ento. Estas li, kiu regas la lingvojn, kaj ne ili lin. Pro tio li apartenas al tiuj malmultaj, kiuj kapablas elekti siajn literaturajn lingvojn por la bono de tiuj ĉi. Li kreis en Esperanto tute novajn, antaŭe ne-aŭditajn tonojn forlasis stile trivitajn padojn kaj alportis al tiu juna lingvo plian stiltavolon, ne sen protestaj krioj el la tria kaj kvara rango de recenzistoj.

Tiu instrumenta koncepto pri lingvo kiu - parenteze dirite - estas je la bazo de la naskiĝo de moderna lingvistiko, sed kies atingoj ankoraŭ ne konkeris ĉiujn kapojn, certe ne estas kongruebla kun la ideo, ke por Manuel de Seabra lingvo povas roli kiel patrio. Lia rilato al lingvo kaj lingvokomunumoj eble estas - kaj mi esperas ne erari en tio - gvidita de alia faktoro, kiun oni povus nomi humanismo. Fari klasifikojn de homoj kaj aŭtoroj laŭ naciaj kriterioj estas esence fremda al li. Kvankam li apartenas al tiuj, kiuj aktivis por la kataluna lingvo ankoraŭ dum la periodo de ĝia malpermeso kaj neniam ĉesis agi en favoro de tiu lingvokomunumo, mi hezitus nomi lin kataluna verkisto. Same, kvankam li estas denaska portugalo, mi ankaŭ hezitus nomi lin portugala verkisto. Estas lia konvinko, ke malgraŭ kulturaj diferencoj la unuigaj faktoroj pli fortas ol la disigaj kaj ke funde la homaro formas unu tuton. Kaj tiu konvinko lin ligas kun la oftalmologo el Pollando, kiu estas konata kiel iniciatinto de Esperanto.

La Internacia Esperanto-Muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis la projekton eldoni la plenan verkaron de Manuel de Seabra en Esperanto, kiu ofte ja rolas kiel originala lingvo. Nun la dua volumo troviĝas en la presejo. Ni esperas per regula aperadritmo en ne tro fora futuro plenumi tiun entreprenon, tiel konformante al lia mondkoncepto kaj disponigante tiun literaturan trezoron al internacia publiko.

© Herbert Mayer kaj ACEC, 1997

1.-Ni memoru, ke la nazioj akompanis siajn murdojn de la judoj per la aserto, ke ili vivas dise en la mondo, havas eksterlandajn parencojn kaj estas kosmopolitoj, sekve certe ekstermendaj perfiduloj de la komuna patrio Germanio.

2.-Piron, Claude: Esperanto el la vidpunkto de verkisto. Viena: Pro Esperanto, 1992.

3.-En: MdS: La armeoj de Paluzie. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1996, p.196.

(Kataluna Esperanto-Asocio dankas la ĝentilecon de la Kolegia Verkista Asocio de Katalunio, kiu rajtigis nin publikigi ĉi-tiun tekston).

Kataluna Esperanto-Asocio ĉiam konsciis pri la gravega rolo kiun instruado havas por nia movado kaj agnoskis la laboron de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj tiukampe. Jam en la jaro 1992, kiam KEA difinis sian instruprogramon, ĝi decidis alpreni la internacian stardandon de ILEI, rezignante pri propraj specifaj ekzamenoj aŭ atestiloj krom tiu de la A-kurso (Baza Nivelo, neekzistanta ĉe ILEI), kaj rekomendante al ĉiuj membroj laŭeble ekzameniĝi en ILEI ekzamenoj.. (vidu "Kataluna Esperantisto" n-ro 281).

Sed nuntempe instruado iom lamas, nur malmultaj regulaj kursoj okazas kaj ni devas denove eklabori por plifortigi tiun agadkampon. Kaj bona rimedo povus esti labori ene de ILEI mem.

En sia lasta estrarkunsido, kaj pro la plua neekzisto de oficiala sekcio aŭ respondeculo, la Ligo nomumis min kiel reprezentanton por (kompreneble!) tuta Hispanio (sed ILEI momente ne vidas problemon havi eĉ pli ol unu reprezentanton, se necesus). Unu el la taskoj de reprezentanto estas starigi oficialan sekcion de ILEI se la kvalito de la agado kaj la nombro de aliĝitaj membroj tion eblas. Ĉiu membro de ILEI ricevas ĝian organon "Internacia Pedagogia Revuo", kun pluraj fakaj artikoloj pri instruado, interŝanĝo de spertoj kaj aliaj interesaj informoj. Krome, ILEI eldonas alian materialon, ekzemple la junularan revuon "Juna Amiko", organizas trejn-seminariojn kaj estas la plej taŭga forumo por la diskutado pri pedagogiaj aferoj.

Kaj membroj de ILEI povas esti ne nur instruistoj aŭ Esperanto-instruantoj sed ĝenerale ĉiuj esperantistoj kiuj interesiĝas aŭ okupiĝas pri lingvo-instruado. Jen bona okazo kunlabori tiukampe.

Interesatoj bonvolu kontakti min: Pedro M. Martin Burutxaga-Cra. Estació, 2-A-5-2-17300 BLANES -pmarti10@pie.xtec.es

la dua duafoje!

Jes, la dua kajero de la komunik-stila lernolibro serio *Tendaraj tagoj* atingis duan eldonon. Jen ĝi, kun 20 plusaj paĝoj, novaj bildoj kaj eroj, tri pliaj koloroj kaj la konataj roluloj (ekz. Adelo kaj la ursol)

Tendaraj tagoj, kajero 2, Stefan MacGill, ILEI/UEA/HJEA, Budapeŝt, 1997. 72p. Ilus. de Pavel Rak. Mendu ĉe UEA aŭ ILEI, pf. 193, H-1368 Budapeŝt. Prezoj ĉe ILEI: 15 NLG, po 10 NLG ekde 3 ekz., po 8 ekde 9. Tio inkluzivas surfacajn sendokostojn.



NUN AŬ NENIAM

NUN AŬ NENIAM, vi fratoj en la rondo,
 Al ni sin prezentas unika vere ŝanco.
 NUN AŬ NENIAM, post naŭza mortodanco,
 Nin vole aŭskultos per spert' jam saĝa mondo.
 NUN AŬ NENIAM ni devas ja paroli,
 NUN AŬ NENIAM decide venkon voli.

Plu ne utilas, dolĉe nur fluton ludi,
 Timeme proponi, aŭ kiel brid'ĉirpeti;
 Urĝas nun brui, vekskue jam trumpeti,
 Severe admoni, per tondra voĉo trudi.
 NUN AŬ NENIAM ĉeestas nia horo,
 NUN AŬ NENIAM: amikoj, al laboro!

Vane vagadas homgento inter ruboj,
 Rigardoj explore trakombas la ĉielon.
 Ve, ĉu ne pruntas la nokto etan stelon,
 Elsavon montrantan el labirint' de duboj ?
 Fratoj, la stelon, la nian, alte tenu !
 NUN AŬ NENIAM ni la gvidon prenu!

Multjare ŝajnis la mond'al ni dezerta,
 Perditaj- la semoj en tero sen fekundo;
 Frukt'nun maturas el sangsterkita grundo,
 Abunda rikolto des pli fariĝas certa.
 Fratoj, kun fido la kampon ni aliru,
 NUN AŬ NENIAM venkfrukton ni deŝiru!

Longe lumetis nur el distanco fora
 Loganta la celo, flameto flagre-tima;
 Nun ĝi fajrflamas jam kiel sun'sublima,
 Heroldas epokon en glori'radie-ora.
 Fratoj, unikan eluzu cirkonstancon!
 NUN AŬ NENIAM ni prenu nian ŝancon!
 Se venku ni iam:
 NUN AŬ NENIAM.

ARA O MAI !

ARA O MAI germans en la nostra obra
 ens ha arribat l'única oportunitat.
 ARA O MAI, feta la macabra dansa
 per l'escarment, ens farà cas tot el món sensat.
 ARA O MAI, decidim-nos a triumfar.

Ja no serveix de tocar dolĉament la flauta,
 proprosar amb por o piulejar com els ocells;
 urgeix fer soroll, despertar amb botzines
 amb veu que retroni exhortant seriosament.
 ARA O MAI ja ens ha arribat l'hora,
 ARA O MAI, amics, anem tots al treball!

Vaga en va la gent per entre els enderrocs,
 i llurs mirades, explorant, pentinen el cel.
 Ai! No ens prestarà el cel un petit estel
 que ens salvi del laberint d'aquest embull ?
 Germans, l'estel, el nostre, portem-lo ben alt,
 ARA O MAI, ens hem de posar al davant !

Durant molts anys ens ha semblat desert el món,
 perdudes les llavors- en terreny que s'ha fet erm;
 ara amb adob de sang el fruit madura
 i una gran collita, segura, ja es veu.
 Germans, amb fe, al nostre camp, anem-hi tots
 ARA O MAI a collir el fruit victoriós !

Ha lluit llarg temps des de la llunyania
 la meta seductora, flama indecisa;
 ara com un Sol gran i sublim flameja
 missatger d'un temps de glòria radiant i àuria.
 Germans, aprofitem l'única ocasió !
 ARA O MAI no l'aconseguirem millor !
 Si hem de triumfar,
 serà ARA O MAI !

Verkita de Teo Jung (després de la guerra mundial)
 Tradukita de Salvador Gumà (oktobro 1997-a)

PRI LA TULUZA MOVADO

Jam la trian jaron sinsekve la tieaj esperantistoj partoprenis en la Printempo de la Lingvoj, kiu celas prezenti publike tiom da lingvoj kiom eblas, ĉiuj laŭ egaleca statuso kaj pripensi ilian plurecon. Ĉi-jare unu el la honor-invitoj estis la granda indiana ĉefo Charles Dawes, tribestro de Ottawa-indianoj el Oklahoma, kiu emis sentenci "Ne perdu vian lingvon, vi perdos ankaŭ vian kulturon". E-budo, bele provizita per mŭziko kaj muzikaj produktoj estis amase vizitata. Koncertis la konata esperantista kantisto J.M. Leclercq kun siaj muzikistoj per 22 kanzonoj en 22 diversaj lingvoj, kompreneble ankaŭ en Esperanto. Sur la ĉefa podio aŭdiĝis prelego pri Zamenhof kaj Esperanto, aktuala demando, de s-ro René Centassi, ĉefredaktoro de granda gazetaragentejo kaj aŭtoro de la franclingva biografio de Zamenhof, "L'Homme qui a défié Babel".

Ankaŭ nun Tuluzo posedas sian straton Zamenhof kiu inaŭguriĝis pasintan majon enkadre de la Printempo de la Lingvoj, sub prezido de la vicurbestrino s-ino F. de Veyrinas kaj de J. Paul Becvort, prezidanto de l'Institut d'Etudis Occitans de tiu departemento, kiu jam komencis lerni Esperanton por prezenti al esperantista mondo dum la 83-a UK en Montpellier la lukton de okcitanistoj por vivigi sian lingvon (vidu foton).

NAŬA E-ĤORSTAĜO

Okazos inter la 22-a de februaro kaj la 1-a de marto 1998 en la Frechede-Montferrier (Lavelanet) gvide de Zdravka Bojĉeva, ĥorestrino el Bulgario. Temos pri trejniĝo el tradiciaj, klasikaj, modernaj kaj originalaj verkoj. (Aliĝiloj disponeblaj ĉe nia Asocio).

LA PAPO EN ESPERANTO

Okaze de la Paska solenaĵo, ankaŭ ĉi-jare la Papo salutis en Esperanto, post la longa vico da lingvoj, nur antaŭ la pola kaj la latina.

TURISMA NORMANDIO

Per la kapfrazo "Estu bonvenaj en Normandio" ni povis konsulti en Interreto plurajn paĝojn de tiu turisma regiono esperantlingve. Se la esperantistoj sufiĉe grandnombre konsultas ĝin, la esperanta versio restos, male ĝi malaperos. Kunlaboru kaj konsultu ĝin: <http://www.normandy-tourism.org>.



FONETIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO

Daniele Vitali denove parolos pri fonetiko en La Chaŭx-de-Fonds ĉe KCE la 28an kaj 29an de marto 1998.

(Pri la ĉiumonataj aranĝoj en KCE nia asocio povas sendi programon al ĉiuj petintoj).

KOLEKTIVA VOJAĜO DE KEA AL LA UK

Por tiuj kiuj ne translokiĝos al la kongresurbo per propra aŭtomobilo, ni proponas tre favoran busan kolektivon vojaĝon.

Jen la prezoj laŭ la nombro da pasaĝeroj:

	membroj de KEA/KEJ		aliaj
20 pasaĝeroj	po	9.000 p-toj	10.000 p-toj
25 " "	po	7.500 " "	8.500 " "
30 " "	po	6.500 " "	7.500 " "

La prezo inkluzivas iran kaj revenan vojaĝon kaj aŭtoŝoseajn kostojn.

LA INTERNACIA ESPERANTO- MUZEO EN VIENO (IEM)

Sendube la plej kompleta depono de esperantaĵoj en la mondo, ĝi definitive fariĝos la Esperanto-Biblioteko de Esperantio, ĉar la patrono de la Aŭstria Nacia Biblioteko tion garantias. Ĝi disponigas du bibliotekistajn postenojn al IEM, sed la buĝeto ne permesas pligrandigon de la havaĵo per aĉetado.

Por ke IEM povu plue ludi sian fruktodonan rolon de universala Esperanto-biblioteko, ĝi bezonas vian helpon. Kiel vi povas helpi? Jen kelkaj sugestoj:

1.-Sendu ĉion, kio koncernas Esperanton aŭ aliajn planlingvojn al IEM.

2.-Fariĝu membro de la Asocio de la Amikoj de IEM. Vi ricevos kvarfoje en la jaro la revuon "La Dua Jarcento" (jarkotizo 2.700 p-toj abonebla tra nia Asocio)

3.-Sendu nacilingvan informmaterialon, kiun oni povas doni al vizitantoj el via lando. Tiamaniere IEM povas helpi al via landa asocio, metante la interesitojn en kontakto kun ĝi. Same sendu informilojn pri viaj aranĝoj en sufiĉe granda kvanto.

4.-Kompreneble IEM ankaŭ akceptas mondonacojn. Vi povus ekzemple pagi aliĝkotizon por samideanoj, kiuj ne povas transsendi monon.

5.-Informu pri la laboro de IEM. Helpu, ke la esperantistoj konsciuj, ke IEM estas ilia muzeo, ilia biblioteko.

Pluajn informojn donas: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Michaelerkuppel, A-1010 VIENO (Aŭstrio)

IEM OFERTAS

La Esperanta kulturo estas kulturo de libroj. Tamen: Esperanto-libroj ne bone vendiĝas. La libro-merkato estas terure malgranda - pli malgranda ol oni kredus: Ekzistas proksimume nur cent esperantistoj en okcidento, kiuj pretas aĉeti literaturan verkon! La rezulto: deficitoj, stagno de eldonado kaj malkuraĝigo de verkistoj. Dum la situacio estas tia, ni ne fieru pri nia kulturo! Aliflanke oni plendas pri altaj prezoj - sed kiel atingi malmultekostecon, se 300 estas sufiĉa eldonkvanto vendota nur post pluraj jaroj?

Por garantii la daŭrigon de sia eldona agado, IEM devas iri novajn vojojn. Kaj pro tio ni direktas al vi la jenan oferton:

■ Se vi decidus aŭtomate aĉeti ĉiun nove aperantan titolon de IEM, vi ne pagos sendokostojn.

■ Vi ricevas 20%-an rabaton! Krome vi havas la eblon mendi aŭ remendi aliajn librojn laŭ la samaj kondiĉoj.

■ Se vi ne loĝas en Aŭstrio, ni faciligas al vi la pagadon: Vi ne unuope pagos la librojn, sed vi ricevos proksimume nur unu- aŭ dufoje en la jaro kolektivan fakturon, pageblan al nia UEA-konto aŭ al nia poŝtĉekkonto en Vieno.

Se tiu oferto interesas vin, bonvolu resendi al ni la formularon (ricevebla ĉe KEA).



VINILKOSMO prezentas al vi la projekton **KOLEKTO 2000**

Okaze de la 10-jariĝo de EUROKKA kaj kunlaborado kadre de Kampanjo 2000, VINILKOSMO (la diskeldonejo de EUROKKA) lanĉas la projekton Kolekto 2000. Temas pri kompaktdiska kolekto kiu startos ekde Printempo 1998 ĝis jaro 2000 aŭ 2002.

La celo estas aperigi dum tiu periodo serion de minimume dek 6/8-titolaj KD-oj el diversaj E-artistoj. La unua KD planita; tiu de "JoMo", devus aperi en aprilo/majo 1998 por festi la 10-jariĝon de EUROKKA. La dua kun kantoj de "Brassens" en E. interpretitaj de "Jacques Yvert", estus preta por la 83-a UK en Montpeliero. Pluraj E-bandoj kaj artistoj estis kontaktitaj kaj interesiĝas pri la projekto; kiel ekzemple interalie "La Kompanoj" el Bordo (Francio) kaj la famkonata E-rokbando "Persone" el Svedio.

Por pliaj informoj kaj klarigoj kontaktu VINILKOSMO-n ĉe: EUROKKA (Esperanto-Rok-Asocio) - FR-31450 DONNEVILLE (Francio).

tel/faks: +33 5 61 81 95 65.

MONTPELIERO, URBO DE LA 83-a UK

(okcitane: Montpelhiér - katalune: Montpellier)


Kontraste kun najbaraj urboj, Nimes, Arles, Marseille, kiuj datiĝas de antikva epoko, Montpeliero estas nur 1000 jara (unua dokumento pri ĝi datiĝas de 985). Cetere ĝi konsistis el du vilaĝetoj: unu apartenis al nobela familio Guilhem, dm la dua dependis de episkopejo Maguelonne (apud la maro).

En 1204, Guilhem-ino, Maria de Montpellier, edziniĝis kun la kataluna-aragona reĝo Petro la 1-a, el kio rezultis, ke unu parto fariĝis kataluna, dum la dua estis franca. Tio ĝis 1349, post kiam la franca reĝo reakiris la katalunan posedaĵon kontraŭ 120.000 oraj eskudoj.


Dank'al ĝia haveno "Port Juvenal", prosperis komerco kun Oriento (spicoj, tinkturoj...). Samtempe disfamiĝis la kompetenco de plant-fakuloj kiuj bone konis la kurac-povon de plantoj. Tio altiris jen studentoj, jen medicinistoj. Kaj en 1289, per buleo de papo Nicolas IV, sankcie estis kreita la "Montpeliera Medicina Fakultato", unu el la plej malnovaj en la mondo. En ĝi kuracistiĝis Rabelais (1530). Pli poste (1593) sekis kreo de "Botanika Ĝardeno".

Montpeliero suferis ĉiujn plagojn mezepokajn: pesto, mizero, malsatego.

Elstara nomo, meze de la 15-a jarcento estas tiu de Jacques Coeur, riĉega negocisto kaj financa superintendanto de Charles VII.



Jen la promenejo "l'Esplanade" dum somero, kiam oni ĝuas la ombbron de ĝiaj platanaj.



Ĉe la fino de la promenejo troviĝas "Le Corum" dumvintre, moderna konstruaĵo, inaŭgurita la 17-XII-1988, konceptita de la arkitekto Vasconi, ĝi entenas la operejon Berlioz, ĉefverko pri akustika tekniko. Ĝi estos nia Kongresejo.

Dum la 16-a jarcento Reformacio enkondukiĝis en Montpeliero. Furiozis la batalo inter katolikoj kaj protestantoj. Preĝejoj, monaĥejoj estis detruitaj multnombre. Katolika reĝo Louis XIII sieĝis la protestantan urbon kiu kapitulaciis post tri monatoj.

La plimulto el la protestantoj fuĝis eksterlanden. Kaj konstruo de citadelo firmigis la potencon de la ŝtato super la urbo.

Louis XIV igis Montpelieron ĉefurbo de Regiono Bas-Languedoc. Altranguloj, impost-kolektistoj, ĉiuspecaj funkciuloj konstruigis por si luksajn domojn, nomitajn "hoteloj". La urbo transformiĝis dank'al arkitektoj d'Aviler kaj Giral.

Akvedukto provizis la urbon per pura akvo. Bela kaj originala grekstila konstruo ornamas la akvo-rezervujon. La placo sur kiu ĝi staras-same kiel la rajd-statuo de Louis XIV- nomiĝas "Le Peyrou". De tie oni ĝuas belegan panoramon.

Pasis la jaroj. En 1839 estis konstruita unu el la unuaj fervojoj, inter Sète kaj Montpeliero. Ĝi faciligis negocon, precipe tiun de vino. De tiam datiĝas la preskaŭ ekskluziva kulturo de vito en la regiono.

En 1930 la loĝantaro atingis 70.000 homojn. En 1990: 220.000 kaj 300.000 se oni konsideras la satelitajn urbetojn. La urbo estas la ĉefurbo de Regiono "Langvedoko-Rusiljono".

ASEMBLEO 1998

Estimata kunmembro,

La Plenumkomitato de KEA statute kunvokas vin partopreni en la Ordinara Asembleo de nia Asocio, okazonta **sabaton 28an de februaro 1998** je la 18'30 h. je unua kunvoko kaj je la 19-a h. je dua kunvoko ĉe **Unesko-Klubo - Mallorca, 207-pral.** Barcelono, laŭ jena:

T A G O R D O

- Aprobo aŭ modifo de la tagordo.
- Legado kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Asembleo.
- Prezento de la agadraporto dum 1997.
- Prezento kaj eventuala aprobo de la bilanco 1997.
- paŭzo-
- Laŭstatuta ŝanĝo de unu triono de la estrarlokoj.
(skribajn aŭ telefonajn kandidatecojn ni akceptos ĝis la lasta momento).
- Propono de agado kaj bilanco por 1998.
- Demandoj kaj sugestoj de la membroj.

Atendante vian partoprenon, kore vin salutas.

Xavier Rodon (ĝenerala sekretario).
tel.798.7385

LIBROSERVO

ZAMENHOF, autor de l'Esperanto

Marjorie Boulton.trad.Jordi Carbonell. Eld.El Llamp.237 p.21'5 cm. Katalunlingva versio de la plej bona biografio de Zamenhof ĝis nun; kun historia resumo pri la kataluna movado de Narcís Fluvià.1.200 p-toj.

ORIGINALA ESPERANTA BILDVORTARO

Sylla Chaves.EldE-Asocio de San Paŭlo 1993. 170 p.21 cm.Ilustrita. Tri mil bildigitaj vortoj, elektitaj kaj ordigitaj por maksimume internacia utileco.1.700 p-toj.

SEN TITOLO

Ivan G.Ŝirjaev. Eld. Pro Esperanto 1995. 336 p. 24 cm. Unu el la unuaj originalaj romanoj en Esperanto.- 3.000 p-toj.

FAJRON SENTAS MI INTERNE

Ulrich Mattias.Eld.Pro Esperanto 1990.100 p. 20'5 cm.1.500 p-toj.

LA ARMEOJ DE PALUZIE

Manuel de Seabra. Eld. IEM.198 p.23 cm. Originala romano de nia kaaluna portugaldevena verkisto. 2.500 p-toj.

PLURALOGO

Vimala Devi. Eld.La Kancerkliniko.79 p.21 cm. Jen la opinio de W.Auldo pri ŝia verko:

“La poemoj de Vimala Devi vekas murmurojn en la animo: grupoj de konceptoj ĵestas filamentojn, frazoj spekuligas nin. Kaj ŝia lingvo envolvas la leganton preskaŭ volupteme, kareseme”.1.200 p-toj.

MODERNA BOSNIA-HERCEGOVINA NOVELO

Antologio kie reprezentigas 25 modernaj aŭtoroj kun ties biografieto kaj klarigo pri la tradukintoj.178 p. 23 cm. 3.000 p-toj.

RAKONTOJ PRI SARAJEVA SIEĜO

Zlatko Dizdareviĉ. Trad. S.Sirovec kaj F.LoJacomio 1993. 80 p. 24 cm.1.500 p-toj.

KARNAVALE

Abel Montagut. Eld IEM. 65 p. 23 cm. Adapto el pluraj popolaj kantoj katalunaj laŭ “Costumari Català” de Joan Amades kaj originala rakonto pri Don Kihoto eksterlande.1.500 p-toj.